

Ploriga, la prelego plej bela

[Origina titolo: La plej bela prelego]

Reveninte el Roterdamo unu afero plej forte restas en mia memoro: la plej bela prelego kaj prezento de la tuta kongreso, fakte de multaj Universalaj Kongresoj (mi partoprenis en dek naŭ aŭ dudek el ili).

Tiu estis la prelego 2008-07-22 de Katalin Kováts, membro de la Akademio de Esperanto, pri Vincent van Gogh. Ĝi estis absolute pinta prelego koncerne al temo, stilo kaj prezentmaniero. Enhave ĝi estis kortuŝa kaj interese. Ĝi estis riĉe ilustrita kaj krome klare aŭskultebla en belega esperanto.

La prelego estis farita sen (videbla) manuskripto, ĉar Katalin nin la tutan tempon rigardis.

Je la fino mi ploris pro emocio – parte pro la tragedio de Vincent sed ĉefe pro ĝojo pri la beleco de la prezento fare de Katalin. Kiam ŝi finis ni longe aplaŭdis – starante, kiel post kanto de opera stelulino. Katalin diris ke ŝi esperas ke ni aplaŭdas por Vincent, sed mi povas certigi ke ni aplaŭdis por ŝi kaj pro ŝia prezento.

Bizara detalo: ŝia propono estis unue rifuzita. Nur lastmomente ĝi estis akceptita en la programon.

La sekvan tagon mi veturis al Amsterdamo kaj vizitis i.a. la muzeon de van Gogh. Tion mi jam antaŭe estis decidinta fari, sed la sperto estis pli riĉa kaj informdona post ŝia prelego.

Christer Kiselman

Pri Vincent van Gogh rigardu <http://www.vggallery.com/>